

## Intimiĝo kun ĉinaj fantomoj

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 579/92-2, 1982 aprilo 29 kaj majo 01.  
<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1982-90/SRI-1982-90-2-579-Claude-kaj-Andree-GACOND-Intimiĝo-kun-ĉinaj-fantomoj.mp3>

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La eldonaĵoj de la Fremdlingva Eldonejo de Ĉina Popola Respubliko estas minejo de instruaj informoj pri kulturo ĝenerale tute nekonata en Okcidento. Sub la aŭspicio de la literatura instituto de la ĉina akademio de sociaj sciencoj eldoniĝis en 1979 naŭdekaĝa broŝuro kun la titolo *Rakontoj pri Fantom-spitantoj*. Belilustrita libreto, kiu, pro la titolo mem, kiu parolas pri fantomoj, malgraŭ la originaleco de la bildoj, ne vekas nian legemon.

A.- Kaj se oni legemas, oni unue tendencas salti la antaŭparolon por tuj eklegi rakonton. Jen la plej mallonga specimeno:

Cl.- "Juan Deĵu iam vidis en necesejo fantomon, kiu estis dekkelkajn futojn alta kun nigra haŭto kaj grandaj okuloj, en nigra sensubŝtofa vesto kaj kun kaptuko sur la haroj, staranta ne pli ol unu futon for de li. Deĵu restis aplomba kaj trankvila, kaj malrapide diris ridetante: Oni diras ke fantomoj estas abomenindaj. Ja efektive! La fantomo hontruĝiĝis kaj fortiriĝis."

A.- Tiu rakonti datumas de la Song-dinastio, tio signifas de la periodo 420-479 post Kristo, do de la kvina jarcento. Ĝi restas enigma, kiel cetere ĉiuj aliaj rakontoj, tiom longe kiam oni ne interesiĝas al la antaŭparolo. Kaj tion ĉi ni nun faru. Per citaĵoj el tiu antaŭparolo, kiu estis videble verkita por la ĉinoj mem, kaj ne por okcidentaj legantoj, oni pli bone komprenas la esprimon "papera tigro", kiun Maŭ Zedong uzis por komprenigi al sia popolo, ke la usonanoj estas nuraj fantomoj, kiam ili ignoras realaĵon, kiel ekzemple estis la ekzisto mem de Ĉinio.

Cl.- Multaj ĉinaj verkistoj de rakontoj kaj skizoj ŝatis skribi pri fantomoj. Tio ofte montris, kompreneble, ke tiuj verkistoj ankoraŭ ne povis sin liberigi el la superstiĉoj pri fantomoj. Sed inter tiuj troviĝis tiaj personoj, kiuj kvankam ili rekonis la ekziston de fantomoj ĝenerale rekonataj kiel timindaj, tamen montris malestimon al ili, instruante ke ili estas neniel timindaj. Ili priskribis homojn, kiuj kuraĝis insulti, forpeli, bati kaj kapti fantomojn. Tiaj rakontoj estas fakte signifoplenaj. Ni ne forgesu, ke la plej malnovaj datumas jam de la tria jarcento post Kristo. La fantomneco estis formo de ateismo aŭ liberpensado. Tiuj verkistoj ne lasis sin kateni de la superstiĉoj pri fantomoj kaj dioj.

A.- Kontraŭe. Tiuj aŭtoroj volas komprenigi, ke se homo ne timas fantomon, sed kuraĝas ĝin spiti, la fantomo formortas. Fantomtimo estas la timoj, la superstiĉoj, la kredoj kaj skrupuloj, kiuj sklavigas nin.

Cl.- En la rakonto *Instruitulo de Ĝangĝoŭ* la heroo ne timas monstrojn de ia ajn speco. Li diras ke "sin trovas nenio timinda en la mondo, nur homoj mem timemas."

A.- La heroo en la rakonto *Fantomoj evitis Giang Sanmang* aŭdinte rakonton pri kapto de fantomo, ĉiunokte ŝtele iris inter tomboj preta por kapti fantomojn kvazaŭ ĉasisto la vulpojn kaj leporojn, sed fantomon li neniam renkontis. En lia memo ili ne ekzistis.

Cl.- La aŭtoro skribis pri li: "Sanmang firme kredis ke fantomoj povas esti kaptataj kaj malestimis ilin en sia koro, tial lia kuraĝo sufiĉis por fortimigi la fantomojn. Pro tio la fantomoj lin evitis anstataŭ ĉagreni."

A.- La rakonto *Ĉen Pengnian forigis fantomon de sinpendiginto per spir-blovo* estas skribita iom harstarige. Ĝi priskribas, ke la fantomo de sinpendiginto "staris rekte, malfermis sian buŝon kaj spirblovis kontraŭ li. La blovo frostis kiel glacio. Liaj haroj stariĝis kaj liaj dentoj interfrapis. La lamp-flamo malfortiĝis, bluiĝis kaj preskaŭ estingiĝis." Sed la sekvanta paragrafo estas signifoplena. Ĉen Pengnian tiam pensis: "Se eĉ la fantomo havas spir-blovon, ĉu ne mi?" Kaj li ekblovis la fantomon per plenpulma spiro, ke tiu fine estis disblovita kiel malpeza fumo formalaperanta.

Cl.- La fantomo en la rakonto *Ĉen Zajheng* faris sinceran konfesion: "La vero estas ke fantomoj timas homojn". Tio kvazaŭ resumas tiujn rakontojn. Juan Deju, kiu vidis fantomon en necesejo, kiel ni legis al vi komence de nia prelego, diris al ĝi ridante kun koro trankvila kaj spirado kvieta: "Oni diras ke fantomoj estas abomenindaj. Ja efektive!" Kaj la fantomo retiriĝis honteme. La rakonto estas mallonga kaj amuza kaj samtempe instrua pri nia psika vivo.

A.- En *Kion Caŭ Ĝuhju rakontis*, temas pri homo, kiu ne timis fantomojn. Li vidis fantomon, kiu montris sin en formo de sinpendiginto kun pendantaj hirtaj haroj kaj longe elŝovita lango por lin timigi. Li diris ridante: "La haroj restas la samaj nur iom malordigitaj; kaj la lango restas la sama, nur iom pli longa. Kio estas timinda en ili?" La fantomo tiam forprenis sian kapon kaj ĝin metis sur la tablon. Li denove diris ridante: "Vi estis ne timinda kun la kapo, kaj des malpli sen kapo." Kaj al la fantomo restis jam neniam alia rimedo.

Cl.- La rimedo kontraŭ fantomo priskribita en *Ĝeng Kjubing* estas ankoraŭ pli brila: "Tial li iris sola kaj legis teretaĝe. Kiam li sidis ĉe skribtablo iun nokton, eniris fantomo kun hirte pendantaj haroj kaj vizaĝo nigra kiel karbo. Ĝi fikse rigardis al li kun ronde malfermitaj okuloj. Kjubing ridis, trempis sian fingron en la inkon, ŝmiris sian vizaĝon nigra per ĝi kaj fikse rigardis per brilaj okuloj en la okulojn de la fantomo. Hontiĝinte la fantomo forkuris."

A.- Kelkfoje ni devas uzi la rimedon de Geng Kjubing, "trakti homon kiel li traktas vin." Tio ne estas por vekti ĉe li la hontemon, sed tio povas meti lin en senesperan situacion kaj devigi lin retiriĝi antaŭ malfacilo." diras la komentariantoj en la antaŭparolo.

Cl.- La fantomoj ne nur estas niaj falsaj ideoj, niaj timoj, ili ankaŭ simbolas la politikan reakcion, la superstiĉajn rezistojn al la vivevoluo, ktp.

A.- Estas interese legi, kiel la antaŭparolaj komentariantoj provas ankaŭ fari komparojn inter la fantomoj kaj la kontraŭrevoluciaj fortoj. Oni tiam pli bone komprenas, ke tiu kolekto de malnovaj rakontoj pri fantom-spitantoj havas edukan signifon en Ĉinio mem, kie la popolo ankoraŭ timas pri la fantomoj.

Cl.- Legante tian libron ni neniam forgesu kompari ĝin al samtempaj verkoj en Okcidento. Fine de la antikva periodo kaj komence de la mezepoko ankaŭ ĉe ni ekzistis nekredantoj koncerne la ĝeneralajn superstiĉojn. La evolufortoj loĝis en tiuj liberigitaj cerboj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond prezentis al vi la libron *Rakontoj pri fantom-spitantoj* eldonita de Fremdlingva Eldonejo en Pekino. Ĝis reaŭdo!